



BULTENO
DE

Malaga
Esperanto
Grupo

La Genaĉero

n-ro 5

NOVEMBRO - DECEMBRO

Jaro 1984a

LA ZAMENHOFA DATREVENO

Denove ni troviĝas en Decembro kaj rememorante la naskiĝon de nia majstro. Kvankam laŭdindas la kutimo plenumi solenajn kaj publikajn agadojn fare de lokaj grupoj kun aŭ sen la apogo de ekstermovadaj rondoj aŭ personoj, mi ŝatas taŭge atentigi pri io ne tiel spektiga kiel la prelegoj, la paroladoj kaj la ekspozicioj sed, pli profundiga kaj efika en ni mem, esperantistoj.

Evidentas ke la plej grava maniero reliefigi la personon estas la plenumo de ties programo serioze kaj senhalte. Ofte okazas, ŝiutagaj devigoj, ni ne kapablas certumi pri io tiel intima kaj grava kiel aparteni al la Movado, konsistigi parton de la, pli kaj pli, granda ensemblo de homoj laborantaj senpage por ke la lingvaj bariloj defalu. Ni estas konvikitaj kaj fieras pro tio. Tamen, foje, la entuziasmo malpliĝas.

Permesu al mi diri iomete plie. La forto de la homo ne devenas de la muskloj nek de la kriado. Inverse, ĝi fontas de la pri penso, de la meditado kaj de la spirito. Tre ofte, ni aŭdas paroli tiel, sed ne atentis serioze. La rezultato estas tre simpla, ni fiaskas dum la meditantej fortigas sin spirite. Kaj mirindas kiel allogas la proksimulojn!

La Movado kaj nia grupo dependas tute de via spirita forto.

Andrés

NIA GRUPO

Denove alia jaro foriras kaj nia grupo pretiĝas komenci novan jaren laborante per kaj per Esperanto.

Bedaŭrinde, ne eblis festi indan Zamenhofan Tagon la pasintan 15an de Decembro ĉar niaj membroj aŭ laboris ĉi tiun tagon aŭ ankoraŭ ekzameniĝis.

La Elementa Kurso, kiu komenciĝis la pasintan Septembron, jam finiĝis, brile finiĝis ni diru, ĉar preskaŭ ĉiuj partoprenintoj atingis la finen kaj ili estos baldaŭ bonegaj samideanoj.

Kaj se paroli pri kursoj, ni sciigas al vi, ke samideane Enrique gvidos Kurson Elementan en la Prilingva Lernejo, komencotan la venontan monaton Januaro.

Ankaŭ dum Januaro oni okazigos Prelegan Rondeton en nia sidejo. La prelegantoj parolos pri kiu ajn temo (kompreneble en Esperanto) dum proksimume 20 aŭ 30 minutoj kaj tuj poste okazos interparolado. Atentu, ke nia unua preleganto estos samideane Francisco Javier el Madrido (kiu pasigis Kristnaskon inter ni). Li parolos pri Madrida Esperanto-Liceo. Date: la 4an de Januaro.

Jaro Nova, Kotizo Nova

Kiel vi certe legis en la numero 4a de nia bulteno, la kotizo de la grupo plialtiĝos de 100 pes. ĝis 150 pes.

Tia plialtigo estas necesa ĉar ni abonas multajn revuojn, ni devas ankaŭ pagi fotokopiojn kaj aĉeti de temp'al tempo kelkajn librojn ĉar se ni esperantistoj ne aĉetas niajn librojn, kiuj aĉetos? Tio estas, ekzistas multaj elspezoj.

Kaj, aliflanke, 50 pes. pli monate supozas nenion por ni.. Danken kaj ĝis!

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

LA MOVADO pri 1985

- De la 5-a ĝis la 7-a de aprilo okazos en Malago la "9-a Renkontiĝo de HEJS". Petu aliĝilojn de ni.
- De la 5-a ĝis la 9-a de julio, en Kartageno (Murcio) okazos la "45a Hispana Kongreso de Esperanto". Pliajn informojn kaj aliĝilojn vi ricevos de la LKK.
- Dum la tagoj 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, en Aŭsburg (F.R.Germanio) okazos la "70-a Universala Kongreso de Esperanto".
- En aŭgusto, de la 15-a ĝis la 18-a, la andaluzoj kunvenos en Sevilo por okazigi la "3-a Andaluzia Kongreso de Esperanto"-n. Por aliĝi turnu vin al LKK: strato Pozo, 3 41003 Sevilla.

MONDA FONDUSO DE SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALISATO. Petu ekzemplerojn en esperanto ĉe: 15 rue V.Duruy, F-75015 Paris.

NOVA RONDO EN SRILANKO. Ili bezonas librojn, revuojn, vortarojn, ktp, kaj ili deziras kontaktojn kun alilandaj amikoj. Skribu al: Esperanto-Grupo Srilanka, s-ro D.B. Jesudasan. "Poste restante" 71, Pagoda Para, Nugegoda. Srilanko

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) eldonis 80-paĝan broŝuron pri la fervojista Esperanto-Movado dum la jaroj 1909-1984a.

LETERO

La Lĥnea, 20 de aŭgusto 1984.

Estimataj gesamideanoj: Ni gratulas pro la bonan organizon de la II^a ANDALUZA ESPERANTO KONGRESO kaj deziras fruktodonan sukceson por disvastigi nian lingvon kaj idealon.

Profitas por informi se eblas anoncu en via intera revueto esperanta pri forpaso de Badiollah Samiry en Teherano (Iranio), li estis delegito de UEA en Iranio, bone konata pro iuj andaluzoj esperantistoj ĉar partoprenis en diversaj kongresoj, estis verkisto de diversaj libroj irana esperanto kaj laboris multe por BEL (Bahaa Esperanto Ligo). De tempo estis en policistejo, estis prenita kun vidvino kaj frato, same membroj de BEL kiuuj scias nenion pri lia sorto. Dum Universala Kongreso de Stokolmo, antaŭ kvar jaroj, la ĉeestantaj BEL membroj, ankaŭ ne bahanoj, petegis geseroj Samiry resti en Svedujo kaj ne reiri al Irano. Ili rifuzis dirante ke tia embarasus al aliaj. Ĉi jare la BEL kunsido dum UK en Vankuvero estos dediĉita al la Sankta memoro de Badiollah Samiry.

ENGHOLM, Stellan (Daŭrigas)

Al la juneca amo li sciis doni individuan kaj apartkarakteran prilaboron. La poezi-inspira sugesto de la vizio pri la amo ekaptas la leganton malgraŭ ke la libro enhavas balastajn teori-ojn.

En 1931, Engholm gajnis la premion de la romankonkurso de L. M. per lia romano "Homoj sur la Tero". Kiel diras TOTSCHKE, "la temo de ĉi tiu libro estas la vivo de bienuloj, diversvojjaj sor-toj, kiujn kunkroĉas la ĉefheroo: la Tero. Sobre, kelkfoje tro-preciza realismo, profundsona psikologio, pura stilo, senripro-ĉa lingvo forgesigas la amkojn de la libro: la malriĉon de okazaĵoj, la tro surtere irantan fantazion".

En 1924, L. M. aperigis "Infanoj en Torento" (la dua parto de ĉiu romano aperis en 1939 en Stockholm) kaj en 1945, "Vivo vokas", la lasta el liaj originalaj verkoj.

Engholm elstaris ankaŭ kiel tradukisto kun klara, flua, sti-lo. Ĉirilate estas devige menciit "La legendo pri Gösta Berling" el Selma Lagerlöf, "Per balono al Poluso" el Andrée, kaj la ne-forgesebla "Malgranda Revuo" kiun la redaktis de 1943 ĝis 1952 kaj kie "ne nur li malkovris novajn talentojn sed precipe li ver-kis mem multajn artikolojn en kiuj ni admiras lian modestan sa-ĝon kaj lian profundan amon al justo kaj lian altan devosenton" (Courtinat).

LUYKEN, Heinrich August

Naskiĝis 10-XII-1864 en Allenkirchen (Germanio) kaj angli-ĝis en 1910a. Edukiĝis en Düsseldorfa Gimnazio. En 1885 venis al Anglujo kaj edziĝis al anglino. Esperantiĝis en 1904a kaj tuj entuziasme propagandis ĝin.

Liaj originalaĵoj en Esperanto estas, inter aliaj, la jenaj romanoj:

"Paŭlo Debenham" (1912)

"Mirinda amo" (1913)

"Stranga heredaĵo" (1922)

"Pro Istar" (1924)

Ciflanke estas notinda la kriterio de W. B. JOHNSON aperinta en Enciklopedio de E-o: "... inter la ĉeffiguroj troviĝas ĉiam unu, kies kristanan kredon subfosis iaj herezaj delogoj aŭ personaj malfeliĉaj. Tio konkludas lin -aŭ eble sin- en periodon de anima turmentigo kaj materialaj danĝeroj, el kiuj lin savas aliaj herooj, kies "simpla kredo" restis tra ĉio neŝancelebla. Tiun moralan armaturon la aŭtoro uzis dezirante servigi E-on al la disvastigo de liaj religiaj idealoj. Konforme al sia simpla, klare fiksita vivkoncepto li kreis figurojn kiuj nekonfuzo reprezentas la potencojn de bono aŭ de malbono."

Ĉiuj verkoj de Luyken estis tradukitaj Brajlen. Nia aŭtoro verkis aŭ tradukis multajn aliajn verkojn. En 1925a "Palestino" kaj la "Biblio" en "Kristana Revuo".

Andrés Martín

LA MALGAJA HISTORIO DE HSI KAJ HO

Iun tagon el la 2.136a jaro a. K., malsata drako kiu intencis manĝi la sunon efikis la teruron de la imperiestro de Ĉinio kaj de lia popolo. Je la komenco tre eta parto el rando de la astro malaperis. Poste, kvarono. Pli poste, la duono, kaj, subite, la tuta suno malaperis kaj nur restis stranga rondo el blanka lumo ĉirkaŭ la nigra spaco kie antaŭe estis la brila disko.

La Ĉinaj, terurigitaj sed tre spritaj, komencis kuri al ĉiuj direktoj ĉe la stranga krepusko, dum ili kriis kaj defiis la drakon, ludante tamburojn, sonorigante iliajn gongojn kaj kurigzajn lignajn instrumentojn. Je la fino, la drako, lacita, lasis sian kaptaĵon sen fini maĝegi ĝin.

Ili savis la sunon, sed la imperiestro, kies ektimo ŝanĝiĝis al indigno, ordonis ke la Imperiaj Astronomoj, Hsi kaj Ho, kiuj servis lin pli bone dum alia epoko, igis hakilumi pro ne averti lin anticipe pri la alveno de la drako. Jen la sennoma epitafo kiu restis:

"Ĉi tie kuŝas Hsi kaj Ho,
kies malgaja sorto ne estas stranga:
Ili mortis ĉar ili ne anoncis
la perfidan eklipson."

Legendo (M^a Carmen B.)

LETEROJ AL LA DIREKTORO

Sinjoro Direktoro de "La Genaĉero":

Atente mi legis la leteron aperintan en la pasinta numero (4) de ĉi revuo. Ĉar la afero rilatas al mi pro tio, ke mi proponis la agadojn menciitajn, jen mia respondo kaj klarigoj.

Kiel diras trafe Rupérez kaj Nikima, estas surprize ke iuj agadoj projektitaj je la komenco de la lernojaro ankoraŭ ne komencis. Mi diras eĉ pli: estas tre bedaŭrinde. Tamen, ĉar ne justas kulpigi senkaŭze personojn, jen miaj klarigoj.

1. La komenco de la Kurso por Infanoj tute dependas de la kornaĉo, ekstermovade, propagando. Oni komisiis konkretajn samideanojn por tia agado sed -mi ne scias la kialon- ankoraŭ ili ne plenumis ĝin. Eble vi kapablas respondi adekvate. Kompreneble nek Maria José, nek mi culpas.

2. La Esperanto Kurso en la Vegetara Rondo, kvankam mi prizorgis rekte la aferon, ne estas ĉar mankis la responda kunlaboro de la estraro de tiu malaga organizo.

3. Rilate al la Prilingva Lernejo mi rimarkas nur ĉi tion: Kiam mi klopodis la aferon rekte la pasintan lernojaron, mankis la ĉeesto de la lernantaro. Cetere, la ĵus pasintan someron, komencis kunvenoj por profundigi pri esperantajn konojn. Ili gvidis samideano Rikardo. Kial oni ne daŭrigis, mi ne scias. Tamen, ĉar nepras havigi solvon al la problemo, mi pretas gvidi novajn kunvenojn, ĉiuvendrede, ekde la venonta 18-a -inkluzive- de Januaro, pritraktontajn lingvajn, movadajn kaj literaturajn temojn. Mi atendas la lernantojn kaj, kiel kutime, aliros al la sidejo de nia grupo por plenumi la promeson ĉiuvendrede.

4. Ne atendu la ekstermovadan helpon por antaŭeniri! Estu bonvenaj la materiala kaj la spirita apogoj! Tamen konvinku vi mem, ke la Movado apartenas al ni kaj nur ni atingos ĝian plifortigon.

5. Pri la laboro farenda ekster la Grupo, mi konsentas tute kun Rupérez kaj Nikima. Mi mem, vi scias, agadas tiel en la Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj klopodas disvastigi la lingvon ene de profesoraj etosoj.

Dankon por la aperigo de ĉi letero.

Andrés

JUNULARA ANGULO

La pasintan unuan kaj duan de Decembre devis okazi la kutima vintra kunveno de HEJS, por pritrakti koncernajn aferojn de ĉi tiu Sekcio.

Sed ĉi tiu kunveno ne okazis pro manko de ĉeestantoj. Sekve, samideano Miguel Angel, prezidanto de HEJS, sendis leterojn al la delegitoj. De tiu de Malago, li petis aliĝilojn por la venonta HEJS-Renkontiĝo.

Ni jam pretigis la koncernajn aliĝilojn kaj oni povas trovi unu en ĉiu ekzemplero de nia revuo.

Ĉar la vintra kunveno malsukcesis kaj okaze de la Andaluza kunveno, okazinta en Malago la pasintan 28an kaj 29an de Decembre, samideano Miguel Angel petis de la andaluzoj, ke ni kunvenos, kune kun samideano F. Javier Moleón el Madrido, por paroli pri la Paska Renkontiĝo. Sed ĉi tiu kunveneto ankaŭ malsukcesis ĉar niaj gesamideanoj el Kordovo ne povis ĉeesti.

Pro tio, oni kreis specon de LKK por la organizado, kies rezultoj estas unue la aliĝiloj kaj due, la intenco presigi bildkartojn rilate la Renkontiĝon. Ni esperas, ke por la venonta numere ni pove montri al vi la bildkartojn.

La proponita temo por la Renkontiĝo estas "La estonto de Esperanto". Eble ni trovos alian ejon por kunveni, similan al la sidejo de G.F.U. Sed ĉar ni jam promesis, ke ne necesos tendoj, se la ŝanĝo eblas, en la nova loko ankaŭ vi ne bezonos ilin.

Se iu havas ian duben, petu de ni pliajn informojn, aliĝilojn aŭ ĉien, kion vi bezonos.

Rafael.

Ni devas prezenti niajn ekskuzojn al nia samideano Ksaĉjo pri la pasinta revuo, ĉar ni faris skriban eraron en lia nomo. Pardonu nin, Francisko Ksabero.

(Daŭrigas de la pasinta numero)

Ekde la Universe komencis per la Granda Eksplodo (Big Bang) jam pasis 20000 milionoj da jaroj; kaj, pro tio, ni vidas ĉi tiujn malproksimegajn objektojn tiel, kiel ili estis 5000 milionoj da jaroj post la Big Bang. Se la kvazaroj troviĝas je tiel grandaj distanco for de ni, tiam ni estas vidantaj unu el la unuaj objektoj, kiuj aperis kiam la Universe formiĝis, kiuj troviĝas en la rando de la Universe observebla. Ĉi tio estas nur hipotezo.

Ekzistas alia hipotezo kiu intencas klarigi la ŝajnigan rapidon dum forirado de tiaj stelaj objektoj. Iuj astronomoj opinias ke la kvazaroj povas troviĝi relative proksime de ni kaj, krom tio, ili akiris gigantegajn rapidojn ne pro la ekspansio de la Universe sed pro ia eksplodo en la mezo de nia Galaksio. Tamen, se tio okazis, ĉiuj kvazaroj forirus de la Galaksia Centro kaj, tiuokaze, oni povus esperi, ke iuj el ili proksimiĝu al ni; sed ĉi tion oni ankoraŭ ne observis. Ĉiuj kvazaroj observitaj foriras de ni.

James Terrell, de la observejo de Los Alamos rifuzas atribui grandan distancon al la kvazaroj kaj li rimarkas, ke ĉi tiu faktoro ne estas decidiga. Laŭ li, se la eksplodo okazis antaŭ sufiĉa tempo, ĉiuj kvazaroj kiuj unue direktis sin al nia Suno, jam preterpasis nin kaj ni vidas ilin forirantaj.

Malgraŭ ĉio ĉi, la granda malproksimo de la kvazaroj estas apogita de rekta pruvo: la mezurado de mikroondaj dissendoj de 3C273 konfirmas ĝian distancon kaj ĉi tien oni povas ĝeneraligi al la ceteraj kvazaroj.

Kvankam la kvazaroj eble perdis iom de sia taŭgeco rilate la Teorion pri la Big Bang (pri la komence de la Universe), laste aperis alia argumento (certe spektakle). Se la Universe komencis per granda eksplodo, ĉi tiu devis dissendi grandegan radioondaron, tro energian: temas pri iksoradioj kaj gamaradioj..

(Daŭrigota)

Kunlaboraĵoj

KOMPRENEBLE

Oni diras, ke nia Julio, Iglesias kompreneble, iras tra tiuj mondaĵ scenejoj sukcesante kaj eltirante aplaŭdojn el la fermistinoj de Kentucky, el la kelnerinoj de la germanaj bieroj kaj, eĉ, el la sinjorino mem de Ronald, Reagan kompreneble.

Oni diras ankaŭ, ke li tiel agadas pere de sinjorino-botelo, kiu nomiĝas Coca, Cola kompreneble.

Kaj mi diras "oni diras" kaj mi diras prave ĉar la spertuloj pri tia kreitaĵo nomata "Marketing", kiuj laboras por la Coca, Cola kompreneble, ne konsideras oportuna montri Julion sur la hispanaj scenejoj dum li disfamiĝas ilian sukcon; ili timas ne nur ne gajni sed perdi eĉ tian malvarmigantan kaj dolĉan bildon, kiun ili jam havas.

En ĉi tiu lando, Hispanujo kompreneble, ni intencas ne nur ke la aliaj ne sukcesos sed ke tiu, kiu triumfas neniam estos pardonita. Denove aperas nia envio, nia genetika forpuŝo al ĉiu, kiu elstaras el al amaso, la sama envio kiu devigis Colón, Cervantes, Larra, Picasso kaj tiom multaj morti en la plej absoluta miskompreno kaj forgesitaj de iliaj samlandanoj. Ne estas vere, ke "neniu estas profeto en sia lando"; la ververo estas ke "neniu estas profeto en sia Hispanujo".

Ĉi tie, Julio plu estos la knabeto de la manoj, enpoŝigitaj, kompreneble, kiu faris anoncojn televide por Josemari, Ruiz-Mateos kompreneble, kiu forlasis sian landon, sian amantan edsinon kaj siajn gefilojn por vendi sin al la usonanoj. Se li kantas hispanlingve, li faros tion per voĉo simila al tiu de la respondeculino pri la megafono de "El Corte", "Inglés" kompreneble, kaj se li kantas angle, lin komprenas neniu.

Julio povas iri ĉiam, kiam li deziras en la Blankan Doman, gravedigi la sinjorinon Nancy, Reagan kompreneble, vendi plia diskon ol neniu kaj gajni la Premion "Nobel" pri Ekonomio kaj Fiziko dum la sama jaro, sed NENIAM, NENIAM li estos la numero unu en sia lando.

Plej malbone estas, ke li ne estas la sola. Severiano Ballesteros posedas golfludan kampon en Japanujo kun ĝiaj dek ok truoj, kaj la urbestro de Santander, de AP kompreneble, deziras konstrui por li unu, kiu havos tri truojn, kaj privatan. Juan Oró kutime laboras en la NASA ĉar ĉi tie ne sufiĉas la mono de la Ministerio pri Edukado kaj Scienco, de PSOE kompreneble, por konstrui al li laboratorion indan, ktp, ktp, ktp,

Sinjoroj, elreviĝu, se vi deziras triumfi en Hispanujo, vi sukcesos nur se taŭro kornobatas vin ĉe la femuro (kaj ĝi mortigas vin ĉar, se ne, ne taŭgas) aŭ se vi atingas eltiri dek du golojn el Malta dum dek minutoj per la piedoj ligitaj.

MI FORIRAS AL MONGOLIO KAJ PARIĜAS BUDISTO

VERKIS: Miguel A. Calderón

TRADUKIS: Rafael López

Miguel A. Calderón estas bona amiko de multaj membroj de nia grupo. Li ne estas Esperantisto sed simpatianto kaj li ĝentile akceptis kunlabori en niaj paĝoj. Dankon.

KRISTNASKO-K-NTO

La infaneto Jesuo kaj la verda estelo el Betleĥemo
Pro redemi la homaron
kaj la esperantistaron
en Betleĥemo naskiĝita
Kristo tie estis adorita.
Ĉiuj alvenas man-en-mano
por honori al Kristo Infano.
La VERDA STELO, tiel brilas
ke, l'aliajn ĝi lumigas.
Rigardu! Ke Kristo Infano
estas ankaŭ SAMIDEANO.



A. Gamboa

-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-XOX-

Granda Frateco Universala

(Daŭrigas) STATUTOJ - ĈAPITRO III

- .ORGANOJ. -

La regantaj organoj de la Fondaĵo estas la PLENUMA KONSILANTARO.

ARTIKOLO 8a.- Asembleo kunvenos en la ordinara kunsido unu fojon ĉiujara kaj en eksterordinara kunsido pro alvoko de la Prezidanto mem aŭ de 25% de ĝiaj membroj. Ĉiuj havas voĉon sed nur la aktivaj membroj voĉdonon.

La alvoko al la Asembleo efektiviĝos per rekomendita latero ene de kies koverto oni enmetos la Tagordon.

Ekskluzive la punktoj menciitaj en la Tagordo estu pritraktitaj. Oni konsideras starigita la Asembleo fare de kvorumo konsistanta en la duono de la aktivaj membroj. Se ne estas kvorumo oni kunvoko ree la Plenkunsidon kun dekvintaga intertempo kaj tiam la Asembleo povas decidi sen limigo de ĉeestantoj.

La Asembleo estas prezidata de la Prezidanto de la Plenuma Konsilantaro, kaj agados kvazaŭ sekretario tiu kiu estos tia ri late ĝiajn Aktojn. La interkonsentoj de la Asembleo devos okazi laŭ simpla plimulto. Kaze de egaliĝo decidos la voĉdono de la Prezidanto.

ARTIKOLO 9a.- Estas kompetenteco de la Asembleo:

- a) Aprobo de administrado, kontoj kaj jara raporto kiujn elmetos la Plenuma Konsilantaro.
- b) La nomumo de la membroj de la Konsilantaro kun la konfirmo fare de la Plenuma Konsilantaro eliranta.
- c) Aĉeto, vendo aŭ cedo de havaĵoj de la Institucio.
- ĉ) La fando, transformo kaj solvo de la Institucio.
- d) La modifo de la statutoj.
- e) La aprobo de la Regularo de Interna Reĝimo.
- f) La aferoj kiujn decidos submeti al ĝi la Plenuma Konsilantaro.

ARTIKOLO 10a.- La Plenuma Konsilantaro devos esti nomunita la Asembleo inter la aktivaj membroj kiuj estos prezentitaj kazaŭ kandidatoj de la Asembleo aŭ de la eliranta konsilantaro konfirmitaj de ĉi tiu.

(Daŭrigota)

